

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

BOTEV RECITALO-
KONKURSO — 84

•

ALTKVALITA
LABORO
UNUALOKE

•

36-a IFEF-
KONGRESO

•

HEROO-MARTIRO

•

TAGOJ DE
E-KULTURO
EN SOFIO

•

ENLANDA MOVADO

•

TRA LA GAZETARO

•

BULGARROJ SUR
EVERESTO



KUN VERVO KAJ KONVINKO



Ensemblo pri arta parolo el Ĉepelare — unua premio pro kolektiva plenumo

Feste ornamita kaj freŝa, Vraca bonvenigis por kvara fojo ĉ. 200 partoprenantojn kaj gastojn de la tradicia **Internacia Konkurso-Recitalo de Botev'a kaj Bulgara Revolucia Poezio en Esperanto**. Ĝi okazis la 26-an de majo en la Distrikta Junulara Domo, enkadre de la kulturaj festoj „**Botev-tagoj '84**“. Ĉe la solena malfermo la plenumantojn salutis kaj bondeziris sukceson Radka Jordanova, membro de Distrikta Komitato de BKP kaj vicprezidanto de Distrikta Popola Konsilantaro, kaj Stojan Pavunĉev, membro de DK de BKP kaj prezidanto de DE de BEA.

En la konkursa programo partoprenis 44 individuaj plenumantoj kaj 7 artkolektivoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio kaj GDR — precipe infanoj kaj gejunuloj, entuziasmigita de la senmorta poeto kaj revoluciulo Hristo Botev.

Botev kreis nacian kaj same internacian, tuthomaran poezion. Li kombinis en harmonian unuecon la specife nacian kun la mondhistoria. La Botev-poezio estas ligita kiel kun la

tradicioj de romantikismo, tiel ankaŭ kun la revoluciaj realismaj tradicioj de la 60-aj kaj 70-aj jaroj de la 19-a jarcento. La idealigo de la heroaĵo, la kliniĝo antaŭ la sublima morto de la batalantoj por nacia libero, la grandiozaj bildoj de la popolaj suferoj kaj batalo, la tragika bildo de la bulgara popolo, — kondukas al la poetiko de romantikismo. Romantikan spiriton havas la fortaj, dramecaj pasioj, la kontrastaj sentoj. Per romantikaj koloroj la poeto pentras la naturon.

Hristo Botev malkovras la socialajn konfliktojn en la epoko de osmana regado en Bulgario, li kreas tipajn bildojn de reprezentantoj de socialaj tavoloj kaj klasoj. Botev vidas kaj pentras per la rimedoj de sia avangarda poezio kaj la heroan, kaj la tragikan, kaj la banalan kaj la abomenindan en sia nuntempo. Sufiĉas mencii la bildon de hajduko, de ribelulo-elmigrinto, de revoluciulo, dediĉinta sian vivon al la batalo por nacia kaj sociala

(Sekvas sur p. 5)

50 JAROJN DIPLOMATIAJ RILATOJ INTER BULGARIO KAJ USSR

Por la bulgara burĝa ŝtato Sovetunio komencis ekzisti ekde la 23-a de julio 1934. Tiun ĉi daton burĝa Bulgario bonvolis starigi diplomatiajn rilatojn kun Sovetunio, t. e. agnoski ties juran ekziston. La bulgara burĝa ŝtato estis unu el la plej obstinaj. Ĝis la 23-a de julio 1934 la plimulto el la kapitalismaj ŝtatoj, inter ili Usono, Grand-Britio, Francio, Italio, Germanio, Japanio, Meksikio, Greklando jam starigis diplomatiajn rilatojn kun Sovetunio. Burĝa Bulgario prokrastis tion preskaŭ 17 jarojn. Finfine tamen la obstineco devis cedi al la realeco, kiu ĝin instigis mem peti pri starigo de diplomatiaj rilatoj. Kaj, paradokse, tio devis okazi en tempo, kiam burĝa Bulgario ekiris vojon, kondukantan ĝin al ties faŝismiĝo. Tiel nerezistebla estis la premo, kiun la popolo, jam delonge agnoskinta en sia konscio la sovetan ŝtaton, uzis al la bulgara registaro.

La dato 23. 7. 1934, kies duonjarcentan datrevenon ni nun notas, restos grava mejloŝtono en la historiaj rilatoj inter Bulgario kaj Sovetunio.



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 53

JULIO

7 • 1984

ALTKVALITA LABORO UNUALOKE!

Ni, bulgaraj esperantistoj, kun eksterordinara atento kaj respondeco devas rilati al la partia programo pri altkvalita laboro en ĉiuj sferoj de la homa socio. Al tiu ĉi gravega problemaro dediĉis specialan kunsidon la Centra Estraro de BEA. En la referaĵo de la Centra Estraro oni legas, ke la programo, aprobita de la Nacia Partia Konferenco, starigas antaŭ la bulgara popolo esencajn problemojn en la evoluo de nia patrolando. Oni solvados ilin konsekvence kaj sendevie sub la gvido de la Centra Komitato de BKP frunte kun ties ĝenerala sekretario k-do Todor Jivkov. Antaŭ la forumo de la nacia konferenco T. Jivkov substrekis, ke dum la kvar jardekoj, pasintaj post la Naŭaseptembra revolucio, nia popolo faris gigantajn paŝojn en la konstruado de la materiala-teknika bazo de socialismo, en la stabiligo kaj perfektigo de la sociordo, en la evoluo de la spirita kulturo, en plibonigo de la vivnivelo de la popolo.

En la pasinteco — oni legas en la raporto antaŭ la forumo — la problemoj pri la kvalito estis solvata depende de la tiam ekzistantaj kondiĉoj. Tiutempe oni devis produkti grandkvante, por kontentigi la bezonojn de la homoj, sed nun la situacio estas tute alia. Nun la problemoj pri kvalito estas teknologia, ekonomia, sociala, politika kaj ideologia. Ĝi koncernas ĉiujn.

Post vigla diskutado pri la problemoj en niaj vicoj, la plenkunsido aprobis tri gravajn rezoluciojn, kiuj celas atingi pli altan ŝtupon en nia agado poresperanta kaj peresperanta.

Vicigante ilin kalendarie, unualoke ni atentigas pri la rezolucio en ligo kun la 40-a datreveno de la socialisma revolucio en nia lando. Ĝi estis kulmino de la klasbatalo, daŭrinta dum jardekoj. Per venko de tiu ĉi revolucio komenciĝis la erao de socialismo kaj komunismo en Bulgario. Inspiranto, organizanto kaj gvidanto de la ribelo estis BKP, kiu ellaboris la strategion kaj taktikon de la batalo, unuigis sub la flago de Patrolanda Fronto ĉiujn kontraŭfaŝismajn tavolojn, preparis kaj gvidis la popolan amasojn al venko super la monarkofaŝisma tiraneco. En la kadro de la popola respubliko la

Esperanto-movado rapide renaskiĝis. Tial kune kun la tuta bulgara popolo ankaŭ ni, esperantistoj celebros tiun ĉi gloran datrevenon. Ĉiu societo kaj ĉiu distrikta estraro organizu specialan kunvenon kiel eble plej solenan. Tie, kie la fortoj mankas, oni partoprenu la kunvenojn de la ceteraj amasorganizaĵoj. Ankaŭ niajn fremdlandajn amikojn oni informu pri tiu nia nacia festo. Ja multaj el ili interesiĝas al kio estas ŝuldata la progreso de Esperanto en nia lando. Simple — la ekzisto de popola registaro, kiu subtenas morale nian movadon, celantan interamikigon, pacan kunekzistadon inter homoj de diversaj nacioj.

La plenkunsido aprobis planon por inde renkonti la 41-an kongreson de BEA, kiu okazos en julio venontjare en Sofio. Ĉiu societo kaj ĉiu distrikta estraro, ankaŭ la sekcioj, povos partopreni en la konkurado pri varbado de novaj membroj, varbado de novaj abonantoj, pri diversaj kulturaj aranĝoj, pri atingiĝoj en agrikulturo kaj industrio. Ĉi-foje la distingigontoj en la konkurado ricevos interalie ankaŭ monpremiojn.


La plenkunsido aprobis kompleksan programon „Centjara jubileo de Esperanto“. La celoj de la jubilea programo estas atentigi la bulgaran sacion pri la progreso de la internacia lingvo en la mondo, pri ĝia rolo en la afero de interkompreniĝo kaj amikiĝo, pri la rolo, kiun ĝi ludas en la pacbatalo, pri ĝia utilo en la sfero de scienco kaj kulturo. Lige kun la centjara ubileo estas antaŭvidataj diversaj internaciaj aranĝoj en nia lando kaj en la regiono de la ceteraj balkanaj landoj.

La tri rezolucioj, akceptitaj de la plenkunsido, indikas la vojon dum la proksimaj tri jaroj. Necesas, ke ĉiu funkciulo en nia movado faru ĉion eblan por ilia realigo, kiel eble plej altkvalite.

Ni streĉu la fortojn gvidate de la devizo: „Altkvalita laboro unualoke! Alta kvalito ĉie kaj en ĉio!“

Nur tiel ni pruvos, ke ni estas karno kaj sango de nia popolo, ke ni marŝas en takto kun la problemoj de la lando.

IFEF-KONGRESO — DUAN FOJON EN BULGARIO



La kongresa prezidantaro. Fotoj: Lasto Nikov

Aktiva partopreno de bulgaraj fervojistoj-esperantistoj en la agado de la Internacia Fervojista Esperanto-Asocio (IFEF), neforgeseblaj impresoj pri la bona organizo de la 20-a jubilea kongreso en Varna 1963, estis gravaj argumentoj por la Estraro de IFEF akcepti la proponon de Bulgara Esperantista Asocio kaj ties Fervojista Sekcio pri okazigo de la 36-a kongreso de IFEF denove en Bulgario — de la 12-a ĝis 18-a de majo 1984 en ripozkomplekso „Suna Bordo“ ĉe la Nigra Maro.

Tiu decido estis nova rekono kaj por la bulgaraj fervojistoj-esperantistoj, kaj por socialisma Bulgario.

Sub la alta protektado de la ministro de transporto de PR Bulgario Vasil Canov, la bulgaraj fervojistoj-esperantistoj, helpe de plej altaj ŝtataj kaj sociaj institucioj, fordonis multajn fortojn por la preparo de tiu grava internacia evento — la 36-a IFEF-kongreso.

La kongresa Komitato, gvidata de la prezidanto Marin Marinov, laboris obstine kaj sindone.

En la preparlaboroj aktive partoprenis ankaŭ respondecaj personoj el la Stata Entreprenejo pri Turismo „Balkanturist“. Estis agrabla koincido celebri du jubileojn samtempe — la 75-jariĝon de IFEF kaj 25 jarojn de la fondo de turista ripozkomplekso „Slanĉev Brjag“ („Suna Bordo“).

DU ANTAŬKONGRESAJ GAZETARAJ KONFERENCJOJ

En Sofio la gazetara konferenco okazis la 7-an de majo en la granda moderna Novotelo „Eŭropo“. Partoprenis reprezentantoj de la plej gravaj amaskomunikiloj — radio, televido kaj de multaj ĉefurbaj gazetoj.

La sekva gazetara konferenco estis organizita la 11-an de majo en la kongresloko mem —

„Suna Bordo“, en hotelo „Kuban“ — por la reprezentantoj de la distriktaj amaskomunikiloj kaj por distriktaj korespondantoj de la ĉefurba gazetaro. La konferencon partoprenis ankaŭ la tuta Estraro de IFEF.

Dum la kongresaj tagoj la Gazetara Servo eldonadis belaspektan informiĉan bultenon en Esperanto kaj disponigadis al la akredititaj bulgaraj kaj fremdlandaj ĵurnalistoj abundajn informojn pri la laboro de la kongreso. Tio kontribuis por la vasta respegulo de la kongreso fare de la bulgaraj amaskomunikiloj.

LA SOLENA INAŬGURO

La 13-an de majo matene en la belegan konstruaĵon de la Kongresejo, riĉe ornamitan per esperantaj kaj bulgaraj naciaj flagoj, venis pli ol 900 kongresanoj kaj gastoj, por partopreni la solenan inaŭguron de la 36-a jubilea kongreso de IFEF.

Sur la scenejo, ornamita per slogano „La reĵoj ligas la landojn, Esperanto — la popolojn“, okupis lokojn la alta protektanto ministro Vasil Canov, la estraranoj de IFEF ĉe-kape kun la prezidanto s-ro Giessner, membroj de LKK. Apude staris dudeko da uniforme vestitaj fervojistoj el diversaj landoj.

Esperanta koruso „Rodna Pesen“ („Patrolanda Kanto“) el urbo Târgoviște plenumis la himnon „La Espero“.

La prezidanto de LKK Marin Marinov bonvenigis la kongresanojn per varmaj salutvortoj, substrekante la grandan preparlaboron de LKK-anoj kaj aparte la ĉiuf flankan helpon de ministro Canov kaj de aliaj altaj ŝtataj kaj sociaj instancoj en Bulgario. Li bondeziris al la kongresanoj fruktodonan laboron kaj agrablan pasigon de la kongresaj tagoj.



La alta protektanto de la kongreso — ministro Vasil Canov salutparolas

En sia salutparolado ministro Vasil Canov diris:

„... Vi venas fortaj per unu neanstataŭebla rimedo por konstrua interkomunikigo — la Internacia Lingvo Esperanto. Utiligu ĝin por vasta interŝanĝo de profesia sperto. Utiligu ankaŭ la favoran eblon, kiun ni disponigas al vi — veturi dum la kongresaj tagoj senpage per Bulgaraj Ŝtataj Fervojoj sur la tuta teritorio de nia lando. Vidu ĝin, ekonu ĝin kaj forportu ĝin en viaj pensoj — tia, kia ĝi estas — lando de paca kreado, de evoluinta ekonomio, de antikva kaj moderna kulturo. Lando, kiu ne avidas fremdajn teritoriojn kaj riĉaĵojn, kiu strebas al paco kaj amikeco inter la popoloj“.

La kongreson salutis kaj bondeziris rezulton laboron ankaŭ Hristo Gorov, prezidanto de BEA, ing. Petâr Todorov, reprezentanto de UEA, Mio Petek (Jugosl.) — en la nomo de FISAİK (Internacia Organizaĵo por Kulturo kaj Arto de Eŭropaj Fervojistoj), Metodi Djakov, sekretario de CK de la Sindikato de Bulgaraj Transportlaboristoj, Jani Nikolov, ĝenerala direktoro de Turista Ripozkomplekso „Suna Bordo“, la urbestro de Nesebâr Vasil Kirov, en kies regiono okazis la kongreso, reprezentantoj de 18 landaj sekcioj de IFEF.

Paroladon-mesaĝon al la kongreso faris la prezidanto de IFEF J. Giessner.

„... Estas tre ĝojiga fakto por ni — li diris, — ke tiu kongreso koincidas kun la 75-jara jubileo de la fervojista E-movado!...

... Nun estas la momento por direkti unuajn oficialajn dankvortojn al la geamikoj el LKK kaj al la aliaj helpantoj, kiuj preparis kaj aranĝis por ni tiun internacian fervojistan forumon. ... Mi ŝatus danki al la ministro de transporto s-ro Vasil Canov pro lia praktika kaj morala helpo!...

... La monda situacio — diris konklude s-ro Giessner — nuntempe atingis tiel altan gradon de minaco por la homaro, ke niaj lingvaj klopodoj por interhoma amikeco kaj interpopola interkompreniĝo, por tutmonda paco estus vanaj, se la homoj ne sukcesus defendi sin kontraŭ subita perforta pereigo pro nukleaj eksplodoj. Tial estas necese, ke ankaŭ ni, esperantistoj, konsciigu pri la fakto, ke nia Tero estas nia plej granda valorajo. ...“

Rimarkinda momento en la solena inaŭguro estis la tradicia „parado“ de uniforme vestitaj fervojistoj-esperantistoj el la diversaj landoj.

OFICIALAJ AKCEPTOJ

La alta protektanto de la kongreso — ministro Vasil Canov donis akcepton-regalon por ĉiuj kongresanoj kaj gastoj, kiun ĉestis ĉirkaŭ 900 partoprenantoj.

En sia nomo kaj en la nomo de la bulgara registaro ministro Canov bonvenigis la gastojn kaj ankoraŭfoje substrekis la altan pritakson de la plej altaj ŝtataj, partiaj kaj sociaj instancoj en Bulgario pri la 36-a IFEF-kongreso kaj pri la nobla laboro de la fervojistoj-esperantistoj.

* * *

La vicprezidanto de la Distrikta Popola Konsilantaro de Burgas — Todorka Murĝeva, akceptis IFEF-estraranojn kaj membrojn de LKK. Ŝi detale konigis al ili la atingojn de la bulgaraj laboruloj dum la jaroj de socialisma konstruado. T. Murĝeva koncize rakontis ankaŭ la historion de la Burgas-regiono.

GRAVAJ FAKAJ KAJ AFERECAJ KONGRESLABOROJ

La kongreso komencis sian laboron laŭ la precizigita ampleksa programo.



Internacia fervojista E-kolegarejo antaŭ la kongresejo

En komuna kunsido la Estraro de IFEF kaj LKK traktis iujn aspektojn de la programo kaj speciale la projekton de Kongresa Rezolucio, kiuj post kolegaj diskutoj estis unuane akceptitaj.

Grava momento en la laboro de la kongreso estis la du plenkunsidoj, okazintaj la 15-an kaj 16-an de majo en halo „Zamenhof“ en la Kongresejo.

La prezidanto de IFEF faris detalajn informojn pri la kunsidoj de la IFEF-Estraro kaj Komitato, pri la estrara raporto koncerne la laborperiodon inter la lastaj du kongresoj.

La ĝisnuna Estraro estis unuanime reelektita kaj vikle aplaŭdita.

Specialan atenton meritas la Kongresa Rezolucio akceptita de la dua plenkunsido en la nomo de 860 kongresanoj el 23 landoj. Inter alie en la Rezolucio oni povas legi: „Helpe de la Internacia Lingvo Esperanto, senkonsidere al ŝtataj limoj kaj malsamaj ideologioj, egalrajte kaj sen lingva diskriminacio ili (la kongresanoj — a. n.) traktas ne nur siajn proprajn problemojn, sed ankaŭ servas al la monda paco — precipe necesa pro la nunaj danĝeraj minacoj de per nuklea detruo de la Tero kaj ne volus, ke la homa sorto dependu de komputila butono. . .“

Estis anoncitaj la landoj dommastroj de la IFEF-kongresoj dum la sekvaj kvin jaroj: 1985 — Vejle, Danlando; 1986 — Jugoslavio; 1987 — Pollando; 1988 — Francio; 1989 — Hispanio.

Bonan laboron faris la Fakprelega Komisiono, kiu traktis la Kongresan fakprelegon „Stato kaj perspektivoj de disvolvo de la fervoja transporto en PR Bulgario“, verkita de Rad Sinigero, ĉefredaktoro de gazeto „Transporten Glas“.

Grandan interesigon provokis la tradiciaj „Aktualaĵoj el diversaj landoj“, pri kiuj informis reprezentantoj de 11 landoj. Tiun ĉi arangon ĉeestis ĉirkaŭ cent personoj.

Vikle, interese kaj profesie altnivele pasis la redaktora kunveno sub la prezido de s-ro Henning Olsen (Danlando), ĉefredaktoro de „Internacia Fervojisto“. Ĉeestis redaktoroj de landaj fervojistaj gazetoj el Belgio, Jugoslavio, FRG, Aŭstrio, GDR, Nederlando kaj ankaŭ reprezentantoj de la Kongresa Gazetara Servo kaj de Bulgara E-muzeo.

La rezultoj de la laboro de la terminara Komisiono estas ege kontentigaj — laŭ la opinio de ing. Szekeres (Jugoslavio), — ĉar estis pritraktita la labormaniero de slipigado de fervojaj terminoj.

Tre granda estis la intereso al la Ĉe-metoda E-kurso. Ĝin partoprenis pli ol 80 kongresanoj, altiritaj de la lerta kaj sprita instrumentario de docento Georgi Dimov el Varna (Bulgario).

La Interkona Vespere kaj la Kongresa Balo altiris en la salonojn de hotelo „Trakia“ centojn da kongresanoj, kiuj sub la gajaj kaj viglaj melodioj kaj ritmoj de bonegaj profesiaj orkestroj dancis kaj amuziĝis en vere internacia amika etoso, renkontiĝis kun malnovaj konatuloj, faris multajn novajn konatiĝojn.

La kongresanoj ankaŭ ĝuis la altnivelajn artismajn plenumojn de bulgaraj geaktoroj, kantistoj, dancistoj, muzikistoj dum la solena kongresa koncerto kaj dum la folkloro bulgara vespero en la Kongresejo.

En la salono de la nova moderna teatro-operejo „Adriana Budevaska“ en Burgas la Bulgara Esperanto-Teatro kun gvidanto Kunĉo Valev prezentis la speciale preparitan por la kongreso komedion „La milionulo“ de la klasikulo de la bulgara literaturo Jordan Jovkov.

Ĉiu vizitinto de la Kongresejo estis allogita de la tabuloj de du atentokaptaj ekspozicioj: „Evoluo de Bulgaraj Ŝtataj Fervojoj“ kaj „Bulgario — antikva kaj nuntempa“, preparitaj speciale por la kongreso.

Agrablajn travivaĵojn kaj konatiĝon kun la beleco, historio kaj kulturo de nia lando proponis al la kongresanoj la du tuttagaj ekskursoj: al niaj antikvaj historiaj lokoj Sumen, Pliska, Madara, al urbo Varna kaj la fama ĉemara ripozloko „Oraj Sabloj“.

ĜIS NOVAJ RENKONTIĜOJ, IFEF-ANOJ! . . .

Kortuŝajn, emociajn momentojn travivis la partoprenantoj en la solena fermo de la kongreso la 18-an de majo vespere: starante, la ĉeestantoj ekkantis kune kun la kantensemblo sur la podio la Esperantan Himnon.

La prezidanto de LKK M. Marinov kore dankis al ĉiuj, kiuj helpis la organizadon kaj la laboron de la kongreso kaj resumis la atingitajn pozitivajn rezultojn.

Sub la ŝtormaj aplaŭdoj de la publiko reprezentantoj de Bulgara Fervojista E-Sekcio transdonis la verdstelan flagon de IFEF al LKK-anoj de la venontjara 37-a IFEF-kongreso en urbo Vejle, Danlando.

En sia konkluda parolado la prezidanto de IFEF s-ro Giessner ankaŭ substrekiis la bonajn rezultojn de la ĉi-jara kongreso.

En la ĝardeno apud hotelo „Olimp“, en ĉeesto de multnombraj kongresanoj estis plantita „Arbo de la internacia amikeco“. Ĝi kreskos kaj memorigos pri la okazinta en „Suna Bordo“ 36-a IFEF-kongreso kaj estos simbolo de la bona volo de fervojistoj-esperantistoj el ĉiuj landoj vivi en paco kaj interkompreniĝo.

Ĝis novaj renkontiĝoj, karaj IFEF-anoj!

„Suna Bordo“ — Sofio,
majo, 1984

DONĈO ĤITROV

KUN VERVO KAJ KONVINKO



D-rino Tjuran Omer el Loveĉ — unua premio pro individua plenumo



Deklamas la plej juna partoprenantino — la 4-aĝa Plamenka Najdenova el Vraca



Deklamas Carola Lehr (GDR)

(Daŭrigo de p. 11)

liberigo. . . Kaj de la pseŭdopatrioto, de la filistro-egoisto, sin direktinta al persona prospero, de la ĉorbagio kaj komercisto. . . La lirika heroo estas nedisigeble ligita kun siaj proksimuloj — patrino, amatino. . . En ties pentrado aparte forte manifestiĝas la poeta kapablo enpenetri la animecon de siaj herooj, senti la plej subtilajn psikologiajn nuancojn de iliaj travivaĵoj. La intereso al unuopa personeco kaj ĝia interna mondo, al la ordinara homo kaj liaj doloroj kaj ĝojoj, estas specifa karakterizaĵo de la Botev-poezio. Kaj tiu ĝia specifaĵo estas rezulto de nova realisma mondkoncepto.

La Botev-poezio estas avangarda poezio. Avangarda estas lia rilato al la bulgara popolkanto — tiu supera belarta fonto de raraj estetikaj valoroj, absolute necesa por poeto kiel Botev. La popolkantaj bildoj estas kolorigitaj per nova rilato al la beleza, al la heroo kaj subluma, ili estas kreitaj per psikologia profundece kaj kompreno, nekonataj al la popola bardo. Botev adoptis la psikologian analizon kiel belartan principon de sia poezio.

Ĥristo Botev kreis poezian formon, nekonatan antaŭ li. La poeto ĉerpas el la riĉa fonto de la popola lingvo, de la poeziaj rimedoj, stilo, poetiko de la popolkanto.

Botev penetris profunde en la bulgaran realaĵon kaj rekreis ĝin en justajn kaj forte efikajn poeziajn bildojn. Li pentris impone kaj originale la popolajn suferojn kaj batalon, senmortigis la naciliberigan epopeon de sia popolo kaj ĝiaj herooj.

La ĉi-jara Konkurso-Recitalo montris iujn plibonigojn rilate la surscenigon, gestojn kaj mimikon. Bedaŭrinde tamen ripetigis iuj malnovaj malperfektaĵoj — tro rapida deklamado, malbona prononcado kaj reduktado de vokaloj. Denove evidentiĝis la neceso pri kompetenta helpo fare de reĝisoroj, aktoroj, pedagogoj kaj elstaraj amatoraj plenumantoj. Ankaŭ ĉi-foje impresis la limigita nombro da versaĵoj de Botev kaj de aliaj bulgaraj revoluciaj poetoj. Oni devas kuraĝigi la pli amasan partoprenon per kantoj pri Botev kaj laŭ verkoj de Botev, kaj pli multajn oratorajn plenumojn.

Per muntaĵo distingiĝis Reprezenta Infana Grupo „Junpioniro“ — Standardo de Paco“ ĉe la Distrikla Junpionira Domo kaj Dramteatro — Vraca, laŭreato de IV, V kaj VI respublikaj festivaloj kaj portanto de oraj medaloj. Ĉefa artgvidanto — Georgi Goranov. La ensemblo plenmerite ricevis la grandan premion kaj laŭreatan diplomon. El la individuaj partoprenantoj plej bone sin prezentis d-rino Tjuran Omer el Loveĉ, kiu meritis la unuan premion.

Angelina Sotirova, prezidantino de la ĵurio, en la solenaĵo okaze de la anonco de premioj, faris jenan paroladon:

„Post ĉiu mia alveno en Vraca la emocio ĉiam ekkaptas min — pro la naturo, donacinta tiom da beleco al tiu urbo, pro la atento de la gastamaj dommastroj. Mia emocio duobliĝas en la etoso de la kulturaj festoj „Botev-tagoj“ — solenaĵoj, en kiuj oni kunpartoprenas en la kliniĝo antaŭ la nomo kaj granda personeco, antaŭ la legendo pri Botev, kreita de ni mem, antaŭ la genia Botev.

Aparte emociis min, ke vi, ĉiuj partoprenantoj en la IV Internacia Konkurso-Recitalo de Botev'a kaj Bulgara Revolucia Poezio en Esperanto, esprimis vian dankon al Botev, kiu transverŝis sian sangon unue en siajn versojn antaŭ ol oferi ĝin en la batalo por libero la 2-an de junio 1876, kaj al ĉiuj liaj posteuloj, pereintaj en la kontraŭfaŝisma ba-

talo. Vi deklamis kaj kantis en la Internacia Lingvo en signo de profunda rekono al nia glora 40-jariĝo de la socialisma revolucio. Vi prezentis tre emocie kaj pasie la ideojn pri sociala justeco kaj libero, t.e. la Botev-spirito, penetrinta en nian animecon.

Speciale mi volus danki en la nomo de ĉiuj partoprenantoj kaj en la nomo de ĵurio al la organizantoj kaj al la soci-amasaj organizaĵoj pro la eksterordinara laboro kaj zorgoj pri flua trapaso de la IV Konkurso-Recitalo“.

Per sia revolucia poezio kaj ideoj Ĥristo Botev apartenas ne nur al la bulgara popolo. Li apartenas al la tuta progresema homaro, batalanta por pli bona vivo, sociala justeco kaj feliĉo. La Botev-Recitalo estas neforgesebla festo por la bulgaraj esperantistoj kaj iliaj eksterlandaj amikoj.

Vraca — Sofio,
majo 1984

EVGENI GEORGIEV

RESONOJ

„Mi vere embarasas min skribi pri tiel bela kaj emocia aranĝo — la IV Internacia Konkurso-Recitalo de Botev-Poezio en Esperanto, kiun mi kaj mia edzo povis viziti dank' al ĝemelaj kontaktoj inter Vraca kaj Pardubice. Mi ne timas diri, ni neniam ĝis nun partoprenis en simila E-aranĝo.

La etoso en la Distrikta Junulara Domo estis agrabla kaj emocia. Forte impresis la grupoj da infanoj kaj gejunuloj, kiuj venis el diversaj lokoj de Bulgario kaj entuziasme kantis kaj deklamis versojn de la granda poeto kaj revoluciulo Ĥristo Botev, kaj ankaŭ de aliaj revoluciaj poetoj.

MILADA HEMERKOVA,
Pardubice, Ĉeĥoslovakio

„Mi estas tre feliĉa konatigi kun la ege ĉarma Bulgario kaj ĝui la famekonatan gastamecon de multaj sinceraj geamikoj en la lando de la rozoj.

Adiaŭante mi havas nur unu deziron: reveni baldaŭ, resti pli longe kaj eble venontjare denove partopreni la Konkurson-Recitalon de poezio de la fama revolucia poeto Ĥristo Botev, kiun mi nun pli bone konas kaj alte estimas“.

CAROLA LEHR,
Neubrandenburg, GDR



Grupo „Junpioniro“ el Vraca — gajninto de la Granda Premio

LA PREMIITOJ EN LA KONKURSO

LA GRANDAN PREMION kaj laŭreatan titolon oni aljuĝas al: Reprezenta Grupo „Junpioniro — Standardo de paco“ ĉe la Distrikta Junpionira Domo kaj Dramteatro — Vraca kun artgvidanto Georgi Goranov pro la spektaklo „Botev kaj ni“.

I. INDIVIDUAJ PLENUMANTOJ

UNUA PREMIO — laŭreata titolo kaj objekta premio estas aljuĝita al: d-ro Tjuran Omer — Loveĉ

DUA PREMIO — laŭreata titolo kaj objekta premio al: Morjana Văleva — Sofio
Daniela Sirakova — Gorna Orjaĥovica

TRIA PREMIO — laŭreata titolo kaj objekta premio al:

Diana Ivanova — Svoge
Nikolina Takova — Ĉepelare
Stamenka Dimitrova — Botevgrad

PREMION de la Centra Estraro de BEA pro grupa recitalo oni aljuĝas al:
Grupo por Arta Parolo ĉe la E-klubo de ESPU „Ĥr. Botev“ — Razgrad kun artgvidantino Radka Stojanova

PREMION de la Centra Estraro de BEA pro individua plenumo oni aljuĝas al:
Plamenka Najdenova — Vraca

KVAR PREMIJOJ de la Distrikta Komitato pri Pacdefendo — Vraca, estas aljuĝitaj al:

Grupo por Arta Parolo ĉe la E-societo — Velingrad kun artgvidanto Dimităr Jdrakov
Grupo por Arta Parolo ĉe E-societo „G. Dimitrov“ kaj ESPU „V. Levski“ — Dimitrovgrad kun artgvidanto Jana Koleva
Zdravka Bogdanova — Plovdiv
Dimităr Stojanov — Gorna Orjaĥovica

DU PREMIJOJN de la Distrikta Komitato por Pacdefendo — Vraca, por eksterlandaj plenumantoj oni aljuĝas al:

Larola Lehr — Neubrandenburg (GDR)
ottar Müller — Frankfurt/Oder (GDR)

PREMIO de la Distrikta Komitato de Patrolanda Fronto — Vraca, pro individua plenumo estas aljuĝita al:
Stanislav Vikov — Ŝumen

PREMIO de la Distrikta Komitato de Patrolanda Fronto — Vraca, pro grupa recitalo estas aljuĝita al: Grupo por Arta Parolo ĉe E-societo „G. Stanev“ — Orjaĥovo kun artgvidantino Nadejda Bosaska

DU PREMIJOJN de la Distrikta Konsilantaro de la Bulgaraj Sindikatoj, pro individua plenumo oni aljuĝas al:

Kalinka Stojanova — Razgrad
Senka Dimitrova — Ĉepelare

SES PREMIJOJ de la Distrikta Estraro de BEA — Vraca, estas aljuĝitaj al:

Veliĉka Vodenicaro — Velingrad
Donka Doĉeva — v. Vodica
Galja Georgieva — Veliko Târnovo
Daniela Denĉeva — Sofio
Emilia Simeonova — Sofio
Darina Radenkova — Svoge

E-LIBROJN KIEL PREMION PRO PARTOPRENO EN LA KONKURSO-RECITALO ricevis:

Milada Hemerkova — Pardubice (Ĉeĥoslovakio)

KVAR PREMIJOJ — senpagaj abonoj de revuo „Bulgara Esperantisto“ por 1985 estas aljuĝitaj al:

Ivaniĉka Konakĉieva — Veliko Târnovo
Ivanka Pacirkova — Botevgrad
Saša Aleksandrova — Madan
Kalina Borislavova — Sofio

II. ARTKOLEKTIVOJ

UNUA PREMIO — laŭreata titolo kaj objekta premio estas aljuĝita al:

Grupo por Arta Parolo ĉe E-societo „Kulturo“ — Plovdiv, kun artgvidantino Veselina Kurteva
Grupo por Arta Parolo ĉe E-societo „Diĉo Petrov“ — Ĉepelare, kun artgvidantino Nikolina Takova

JURIO: Prezidantino: Angelina Sotirova

Membroj: Kunĉo Vălev
Donĉo Hitrov
Stojan Pavunĉev
Snejina Angelova
k. t. sc. inĝ. Kiril Velkov
Ljubomir Trifonĉovskii

Tra la leteroj

Estimata A. G.,

Mi estas Via nova Leningrada amiko Vitalij Titov. Mi havis la plezuron aŭskulti Viajn rakontojn pri G. Dimitrov en la Leningrada Domo de Amikeco. Mi sendas la Vi korespondadon el ĵurnalo „Veĉornij Leningrad“ pri bulgara temo, sub titolo „Uzina skulptisto“ de V. Karpuŝenco.

La laboristo el la meĥanika fako de l'Unuiĝo „Kirov-uzino“ M. L. Jarjevskij estas konata kiel talenta amatora skulptisto. Li estas aŭtoro de portretoj de multaj laboristoj de l'uzino, de verkisto M. Soloĥov, de poeto M. Svetlov, de Luis Corvalan, de Ernst Thälmann. Li kreis ankaŭ du portretojn de G. Dimitrov.

„Kun granda intereso mi laboris la portretojn de la bulgara popola gvidanto, — rakontas M. Jarjevskij. — Min ĉiam raviĝis de lia kuraĝo, maltime, kun kiu li akuzis la faŝismon. Min igis turniĝi al tiu ĉi temo ankaŭ la intimaj kontaktoj de internacia amikeco de la laboruloj el nia uzino kun bulgaroj. . .

En la muzeo pri la historio de l'Unuiĝo estas multe da memoraĵoj de amikeco, interligantaj niajn du popolojn. En la entreprenon ofte venas leteroj el la frata lando.

HEROO-MARTIRO

En novembro 1927 la Distrikta Komitato de BKP konfirmis la elekton de Ivan Dimitrov Armin kiel sekretario de la Distrikta Komitato de la Komsomolo en Plovdiv. Naskita en januaro 1904 en vilaĝo Gorno Brodi, Grekio, nur naŭjara Ivan ekiras la dornohavan vojon de elmigrinto. Dum la Unua Mondmilito li loĝas en iu vilaĝeto apud Ksanti, kie loĝis ankaŭ mi. Ivan perlaboris siajn vivrimedojn en la tabaktenejoj en Ksanti. Kiam en novembro 1919 la Egea regiono estas aldonita al Greklando, familio Armin transloĝiĝas en Plovdiv, kie Ivan aliĝas al la vicoj de la multnombra armeo de tabaklaboristoj. Li vizitas la partian klubojn, ĉeestas lekciojn pri politikaj problemoj, lernas aŭtodidakte, ellernas la internacian lingvon Esperanto kaj havigas al si revolucion literaturon el eksterlando.

Kune kun la ceteraj membroj de la Distrikta Komitato de la Komsomolo—Stojan Kostadinov, Krástjo Muratov kaj Haralampi Goĝev, li heroe penas restarigi sur nelegala bazo la jun-komunistan organizaĵon en la urbo kaj la distrikto. Laŭ iniciato de la Distrikta Komitato komenciĝas la kreo de laŭleĝaj junularaj societoj, kiuj la 24-an de majo 1928 partoprenas la fondon de Laborista Junulara Unuiĝo. Estas organizita preseja bazo, en kiu laboras Stojan Kostadinov.

En decembro 1929 la presejo estas malkovrita, kaj la polico faras arestojn en Plovdiv, Asenovgrad kaj en iuj vilaĝoj de Plovdiv-distrikto. Estas arestita ankaŭ Ivan, sed en la polico li kondukas fiere kaj ne perfidas la organizaĵon. La konfiskitan E-literaturon oni prezentas kiel akuzmaterialon. La faŝista tribunalo kondamnas lin al 6-jara severa malliberigo kaj ĵetas lin en cementan karceron-tombon. La vintro estas tre malvarma kaj Ivan malsaniĝas je reŭmatismo.

Amnestiita en 1933, Ivan sin kuracas en diversaj banlokoj, sed senrezulte. La help-organizaĵo sendas lin por kuracado en Sovetunio. Post la milito Armin revenis el USSR kaj en la komenco estis instalita en la malsanulejo de Ruĝa Kruco, kaj pli malfrue — en Bankja. En tiu bankuraca urbeto, ĉe tiu „duonhomo“, kiel li mem ŝerce sin nomis, ofte penas konatuloj kaj liaj batalkamaradoj. Ankaŭ mi vizitis lin ĉiudimanĉe, portis al li esperantaj revuoj kaj librojn. Mi instigis lin verki siajn rememorojn, aŭ, se tio estas malfacila por li, rakonti ilin al mi.

— Sed mi ne faris heroaĵojn, — li respondis kaj ne volis verki pri si.

Unu tagon mi sukcesis konvinki lin rakonti pri sia restado en USSR.

— En 1936 — malrapide komencis Ivan, — mi sukcesis ricevi pasporton kaj feliĉe alvenis en Istanbulon. Tie mi trovis la sovetan konsulejon. Mi diris al la konsulo, ke IOHR (Internacia Organizaĵo por Helpe al Revoluciuloj) sendas min sin kuraci en USSR. Li promesis starigi la demandon kie necese. La malmulta mono, pri kiu mi disponis, baldaŭ finiĝis. Mi malsatis. Iu mia samnaciato, kiu perlaboris por la ĉiutaga pano kiel akvoportisto, proponis al mi fariĝi lia kolego. Tutan tagon mi tenis korboboteleĝojn kun trinkakvo por perlabori iom da mono. Sed mi ne eltenis longe — la laboro estis tre laciga. Mi malsaniĝis kaj kuŝis en iu gastejo. Resaniĝinte, mi devis vendi mian jakon por pagi al la gastej-mastro. Mi ofte iris en la konsulejo por la vizo, sed ĝi ne venis. Mi jam estis decidinta reveni Bulgarion, sed en la lasta momento mi havis feliĉon.

— Per sovetaj vaporŝipo — rakontis plu Ivan — mi venis Odeson. Tie oni loĝigis min en la komunloĝejo de IOHR. Iom poste oni sendis min en Soĉi, kie oni kuracis min — ĝis la fino de januaro 1937. Sed mia stato ne pliboniĝis. En iu glacie malvarma februara tago mi alveturis Moskvon. Oni loĝigis min en la hotelo de politikaj elmigrintoj. Ĉe bela vetero mi konatiĝis kun Moskvon, vizitis muzeojn. La akuta reŭmatismo ĉiam pli senmovigis min. Oni sendis min por kuracado en Kvara Moskva Malsanulejo, kie ĉefe estis la bulgaro-politika elmigrinto Cvetan Kristanov. Oni submetis min al diversaj kuracproceduroj, sed nenio helpis. Tiam oni revenigis min en la hotelon. Iom post iom mi plene senmoviĝis. Iun tagon en mian ĉambron venis du hospitalaj flegistinoj kun portilo. La hospitala aŭto veturigis min en la Domon de Invalido, cent dudek kilometrojn oriente de Moskvon, en la vilaĝeto Birljuki, Noginskij-regiono. Depost tiam, jam dudek kvin jarojn mi estas alligita al la lito. Dum la jaroj de la Patrolanda Milito mi trikis gantojn por la soldatoj el la Ruĝa Armeo kaj mi sentis min utila homo. . .

Ivan finis sian rakonton, tre laca pro la longa parolado:

— Dank' al IOHR mi revenis en la patrolando. Nur tio ĉagrenigas min, ke mi ne povas traveturi la landon, por vidi kiel beligaĵoj kaj vilaĝoj. . .

Ivan Armin fermis por ĉiam la okulojn la 9-an de junio 1963, estante 59 jarojn aĝa, 25 el ili li travivis senmova pro la malsano.

TAGOJ DE LA ESPERANTA KULTURO

Sofio, 25--27-a de majo 1984

Fine de majo j. k. en Sofio por tria fojo okazis Tagoj de la Esperanta Kulturo.

Tiun jam tradician aranĝon organizis la Urba Estraro de BEA kaj la Centro por Esperanta Kulturo kaj Propagando „M. Gorkij“ en Sofio.

„ESPERANTO KAJ KULTURO“

Plej grava momento en la programo de la Tagoj de Esperanta Kulturo'84 estis la Scienc-Praktika Konferenco pri temo „Esperanto kaj kulturo“, okazinta la 26-an de majo. Kiel prelegantoj estis altiritaj konataj reprezentantoj de la Bulgara E-movado — prof. S. Guĝev,

de la kulturo. Li altiris la atenton de la publiko sur la fakton, ke oni ne povas krei kosmopolitan kulturon dum ekzistas klasaj socioj kaj klasbatalo.

En la referaĵo „Esperanto, kulturo, pacbatalo“, kiun prezentis al la ĉeestantoj Nikola Aleksiev, honora prezidanto de BEA kaj de MEM, li traktis la taskojn de la E-kulturo en la batalo por paco. Li rememorigis la ideojn de V. I. Lenin kaj L. L. Zamenhof pri paco kaj frateco inter la popoloj, emfazante, ke Zamenhof — demokrato kaj batalanto kontraŭ la milito, estimis la pacan konkuradon de la popoloj sur kultura podio.



La konferenco pri Esperanto-kulturo

C. Ignev, N. Aleksiev, B. Beleva, Iv. Keremidĉiev, D. Terziev, N. Valjaviĉarska. En daŭro de 4 horoj antaŭ la publiko estis prezentitaj 7 referaĵoj, en kiuj estis tuŝitaj diversaj flankoj de la teorio kaj praktiko de la E-kulturo.

En sia referaĵo „Esperanto kaj kulturo“ prof. S. Guĝev sufiĉe detale kaj motivite traktis la noción kulturo, klarigis, ke ĝia enhavo ŝanĝiĝas depende de la epoko, mondkoncepto ktp. Substrekinte, ke la kulturo estas nedisigebla de la lingvo, ke ĝi floras kaj evoluas sur la bazo de la naciaj lingvoj, li respondis pozitive al la demando „Ĉu Esperanto povas krei propran kulturon?“. Konklude prof. Guĝev difinis la E-kulturon kiel veran internacian skolon por kunlaborado en ĉiuj sferoj de la vivo.

En referaĵo titolita „Filozofia interpreto de kulturo“ C. Ignev parolis pri la klasa enhavo

Interesa kaj enhavoriĉa estis la referaĵo de la konata kaj ŝatata aktorino B. Beleva „Esperanto kaj teatro“. Ŝi parolis pri la naskiĝo de la E-teatro, pri ĝia evoluo kaj estonto kiel unika fenomeno en la historia evoluo de la teatroarto en monda skalo.

En sia referaĵo „La bulgara E-gazetaro“ Iv. Keremidĉiev altiris la atenton de la publiko sur la rolon, taskojn kaj enhavon de la bulgaraj E-eldonaĵoj. „Per niaj amaskomunikiloj ni propagandas Esperanton kaj la bulgaran kulturon, la ideojn de nia socialisma lando“, — li diris.

„E-kanto, ĥoro kantado kaj E-kulturo“ estis la referaĵo de D. Terziev, direktanto de la Sofia E-horo. Li rakontis pri la historio de la ĥoro, pri ĝiaj sukcesoj, problemoj kaj taskoj.

Pri la laboro de la Centro por E-Kulturo

kaj Propagando „M. Gorkij“ parolis Nedka Valjavičarska.

Post la raportoj oni donis la parolon al la ĉeestantoj, kiuj starigis multajn demandojn precipe lige kun la bazaj referaĵoj de prof. Guĝev, C. Ignev kaj N. Aleksiev. Estis fari-taj ankaŭ diversaj proponoj por plibonigo kaj variigo de la programo de la estontaj Tagoj de E-Kulturo en Sofio.

„NI KAJ NIAJ ANSTATATAŬANTOJ“

Denove la saman tagon, 26-an de majo ves-pere, en la salono de kulturdomo „Emil Se-kerĝijski“ estis prezentita koncerta programo, titolita „Ni kaj niaj anstataŭantoj“.

La koncerto komenciĝis per la espe-ranta himno „La Espero“, plenumita de la Sofia E-horo. La ĥoristoj prezentis progra-mon el kelkaj kantoj. Tre bonan impreson fa-ris la plenumo de „Odo de ĝojo“ el la Naŭa Simfonio de Beethoven.

Tre bone sin prezentis la konataj kantisti-noj Maria Angelova kaj Stefka Kalimenova, altiris la atenton de la publiko Jana Cikalova kaj Stefan Paskulov. Veselin Damjanov plenu-mis arion el la opereto la birdvendisto de Zeller kaj la kanton „Gardu la pacon“, kies melodion li mem komponis laŭ la konata ver-saĵo de Asen Grigorov. Deklamis la aktoroj M. Ĉobanov kaj M. Zdravev.

La publiko, kiel kutime, tre bone akceptis kaj elkore aplaudis siajn ŝatatajn kantistojn kaj aktorojn. Sed ĝi estis vere surprizita kaj ravita de la dua parto de la koncerto, kiam sur la podio aperis junaj talentaj plenumantoj. El iliaj buŝoj nature kaj senartifike sonis la vi-vanta lingvo Esperanto. Forte impresis la popolkanton, plenumita de Georgi Petrov el Slivnica, la muzika deklamkomponaĵo de Neli kaj Iva Ivanovi. Kulmino de la programo estis la bonega kantensemblo „La buntaj koltukoj“ el Bojuriŝte (gvidanto kaj aŭtoro de la kantoj Petăr Rusinov) kaj la ĉarma infangrupo de Maria Manolova el 152-a infangardeno en Sofio, kiuj ravis kaj kortuŝis la publikon per siaj kantoj kaj dekla-maĵoj sub komuna simbola titolo „Esperanto estas la lingvo por ni“.

Mi turnis min al la kantistino Maria Ange-lova, por ekscii ŝian opinion pri la koncerto. Jen estas ŝiaj vortoj direktitaj al la vasta E-publiko, al ĉiuj ŝatantoj de la arto sur E-sce-nejo: „Estas malfacile por mi kiel organizanto kaj samtempe plenumanto komenti la kon-certon. Kaj tamen se mi plenumis la peton de la redakcio, mi faris tion precipe por dividi mian ĝojon pro la varia kaj interesa programo, kiu estis rezulto de la komparo de plenaĝaj rekonitaj plenumantoj kaj la plej juna gene-racio.“

La ideo pri simila koncerto, kiu tieldire alfrontis la „veteranojn“ kaj la junajn talen-tulojn, kiuj bonege sin manifestis en naciaj festivaloj dum la lastaj jaroj, venis kiel re-zulto de la deziro rompi la tradicion. Por nia granda ĝojo la junaj „artistoj“ sukcese eltenis la konkuron kun la „veteranoj“ kaj entuziasmi-gis la publikon. Evidente, ni jam povas esti trankvilaj pri la estonto de la bulgara kantar-to sur esperanta scenejo. . .“

RENKONTIĜO DE ANOJ DE LA LITERATURA RONDO

La saman tagon, en la kvara horo posttag-meze, en la restaŭrita iama partia klubejo sur str. „Caro Simeon“ 53 okazis la tradicia renkontiĝo de anoj de la Literatura Rondo. En tre intima medio originalajn kaj tradukitajn verkojn legis M. Ĉobanov, S. Sokolov, M. An-gelova, T. Soŝev, Neli Abaĝieva kaj V. Olja-nov.

Fenomeno de la renkontiĝo estis la sinpre-zento de la juna Kremona Băceva per la de ŝi mem tradukita versaĵo de Hristina Vasileva „Fabelo“. Si impresis per artisma deklamado kaj varmaj nuancoj de sia riĉa voĉregistro.

„LA MILIONULO“ SUR ESPERANTA SCENEJO

La 25-an de majo en la salono de la Junulara Teatro „L. Jivkova“, en la kadro de la Tagoj de Esperanta Kulturo „Sofio'84“, la bulgara E-teatro, sub la gvidado de Kunĉo Vălev, prezentis la komedion „La milionulo“ de Jordan Jovkov. La teatraĵon tradukis Kunĉo Vălev. Reĝisorino de la spektaklo estas Ger-truda Lukanova. En la ĉefroloj sin prezentis Anani Anev, Belka Beleva, Veneta Zjumbo-leva, Nikolaj Uzunov, Hrisula Garili k. a.

Tio estis dua tre sukcesa prezento de la spe-



Sceno el la teatraĵo „La milionulo“
Foto: Venelin Vitski

taklo, post tiu en Burgas, sur la scenejo de teatro „Adriana Budevskā“, dum la 36-a IFEF-kongreso, okazinta en „Suna Bordo“ la 12—18-an de majo j. k.

EKSPOZICIO DE INFANAJ PENTRAĴOJ

La ĉi-jaraj Tagoj de la Esperanta Kulturo en Sofio komenciĝis per malfermo de modesta ekspozicio de infanaj pentraĵoj — la 25-an de majo posttagmeze, en la E-kunvenejo sur str. „Serdika“ 13. Al la atento de la ĉeestantoj estis prezentitaj dudeko da pentraĵoj de infanoj 6—12-jaraj — membroj de la Infana E-Klubo „Standardo de la Paco“, fondita de s-no Ivan Pavec ĉe la Junpionira Domo en Kolarov-subdistrikto, Sofio. En tiu klubo membras junaj ŝatantoj de la artoj — pentrado, kanto, deklamado ktp.

La malgrandaj infanoj el 152-a infanĝarde-
no en Sofio preparis siajn pentraĵojn sub la gvidado de sia instruistino Maria Manolova. La pli aĝaj estas anoj de Rondo pri Pentro-arto ĉe la Junpionira Domo. Malgraŭ ke la infanoj komencis lerni Esperanton antaŭ nelonge, ili jam bone scias kiu estas ĝia ĉefa ideo — interamikiĝo de la homoj, por ke regu paco sur nia bela planedo Tero.

„JUNAJ ESPERANTISTOJ EN LA UNUAJ VICOJ DE LA PACBATALO“

Sub tiu ĉi devizo, kiu fakte estis la titolo de la baza raporto, prezentita de Iva Ivanova, pasis la laboro de la konferenco de junaj esperantistoj en Sofio, kiu okazis la 27-an de majo matene en la muzea klubejo sur str. „Caro Simeon“ 53.

Ceestis ĉirkaŭ 20 gejunuloj.

La raporto de Iva Ivanova havis kiel mon-
ten jenajn multsignifajn pensojn: „La estonto apartenas al Esperanto“ (M. Gorkij) kaj „La estonto apartenas al tiuj ideoj, kiuj estiĝis ideoj de la junaj homoj“. (T. Jivkov). Generaligante tiujn du sentencojn, la prelegantino eltiras la konkludon, ke la estonto apartenas al ideo, egale propra al la junularo kaj al la esperantistoj — la ideo pri paco.

Per referaĵoj sin prezentis Libertaria Mladenova („Bulgaraj esperantistoj en la batalo kontraŭ milito kaj faŝismo“), Ani Sotirova („Pacrimedoj en la batalo por malmarmado“), Mariana Elenova („Informo pri la internacia renkontiĝo de pacbatalantoj „Pardubice‘84“).

Parolis ankaŭ D. Haĝiev, prezidanto de la bulgara MEM-komitato, kiu denove substre-
kis en sia eldiro, ke la loko de la junaj espe-
rantistoj estas en la unuaj vicoj de la pacba-
talo.

RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ-AKTOROJ KAJ MUZIKISTOJ KAJ DE VIRINOJ-AKTIVULINOJ DE BEA

La 27-an de majo matene en la klubejo sur str. „Serdika“ 13 okazis renkontiĝo de membroj de la Sekcio de Aktoroj kaj Muzikistoj-esperantistoj. Ĉeestis 29 personoj. Post la enkondukaj vortoj de la prezidantino Maria Ange-
lova, la parolon prenis C. Ignev, responde-
culo pri la kulturcentro „M. Gorkij“ ĉe la UE de BEA, kiu parolis pri la antaŭstarantaj tas-
koj de la Sekcio. Eldirojn faris la pliparto de la ĉeestantoj. Estis faritaj multaj proponoj pri plivastigo de la sekcia agado.



Virina E-renkontiĝo

Foto: Lasto Nikov

La saman tagon posttagmeze en la muzea klubejo sur str. „Caro Simeon“ 53 okazis Renkontiĝo de Virinoj-Aktivulinoj de BEA. Tiu renkontiĝo pasis sub la prezidanteco de Vasja Petrova, sekretariino de la Virina Sekcio ĉe BEA. Si raportis pri la agado de la sekcio dum la pasinta jaro kaj pri sia veturado tra Jap-
nio, pri siaj kontaktoj kun japanaj virinoj-esperantistinoj.

La ĉeestantinoj omaĝis la memoron de la pasintjare forpasinta membro de la Sekcio Rajna Konstantinova.

Pri sia esperantista agado parolis la vete-
ranino Tinka Lakova. Si donacis al la arkivo de la Virina Sekcio silkan tukon kun memoriga surskribo de la Internacia Virina E-Renkonti-
ĝo por Paco en Budapeŝto, julio 1961.

Lasta punkto en la tre riĉa programo de la Tagoj de Esperanta Kulturo Sofio‘84 estis la Balo de Junaj Esperantistoj, okazinta diman-
ĉe vespere (la 27-an de majo) en la salono sur str. „Serdika“ 13.

Ni esperu, ke venontjare la Tagoj pasos an-
koraŭ pli sukcese kaj rezultodone, ke en ili partoprenos ankaŭ gesamideanoj el la tuta lando kaj ankaŭ el eksterlando.

LIDIA RAEVA

RADOSLAV TRIČKOV — 85-JARA



Stojan Pavunčev gratulas la jubileulon

Post la finiĝo de la konkursa programo de la IV Internacia Konkurso-Recitalo de Botev-Poezio en Esperanto en Vraca, oni celebris la 85-jaran jubileon de la elstara socia kaj kultura aganto, esperantisto-veterano, aktiva batalanto kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo RADOSLAV TRIČKOV. Krom plenumantoj kaj gastoj de la Konkurso-Recitalo, la solenaĵon ĉeestis ankaŭ multaj urbanoj kaj esperantistoj.

Gratulparolojn al la jubileulo direktis Mladenov, estro de fako „Industri-ekonomia“ de Komunuma Komitato de BKP, Stojan Pavunčev, membro de Distrikta Komitato de BKP kaj prezidanto de DE de BEA, Kunčo Vălev, ĝenerala sekretario de CE de BEA, Sofio, Kiril Velkov, vicprezidanto de DE de BEA. Geno Genčev, membro de la plenkunsido de Distrikta Konsilantaro pri Kulturo, dekoris R. Tričkov per ora insigno, kaj Mitko Mitev, membro de la Estraro de Modela Popola Legejo „Razvitie“, enmanigis al la jubileulo honoran diplomon kaj dekoris lin per ora insigno de la Legejo.

Sekvis mallonga belarta programo, en kiu sin prezentis infanoj el Legejo „Razvitie“ kaj plenumantoj, partoprenintaj la Konkurson-Recitalon. K. Vălev majstre deklamis la poemon „La vojo“ de d-ro L. L. Zamenhof.

La agadon de Radoslav Tričkov alte pri-taksis la Partio, ŝtato kaj socio. Li estas portanto de multaj distingoj. Okaze de la 85-jara jubileo, per dekreto de la Stata Soveto Radoslav Tričkov estas honorita per ordeno „Naŭa de Septembro“.

La CE de BEA kaj la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ elkore bondeziras al la jubileulo sanon, ĝojon kaj longan vivon.

EVGENI GEORGIEV

ANIAJ DISTRIKTAJ KONFERENCIOJ

GABROVO

La 5-an de majo 1984 okazis priagada konferenco de la distrikta E-organizaĵo. Ĝi okazis en la verda salono de la Domo de Kulturo — Gabrovo. Gastoj de la konferenco estis Stefka Ĉenkova el la Centra Estraro de BEA — Sofio, kaj Livorov el la Distrikta Komitato de BKP — Gabrovo.

Lernantinoj el la fakultativa E-klaso de Rumjana Janeva en la „Aprilov“-gimnazio, premiitaj en la ĉi-jara Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto en Plovdiv, salutis la delegitojn de la konferenco.

Raporton pri la dujara E-agado faris Nikola Poparov, prezidanto de la Distrikta Estraro de BEA — Gabrovo. Sekvis vigla diskutado. Geno Manev parolis pri la sukcesoj de la E-agado en Drjanovo, pri la laboro kun ĉiuj lokaj sociaj organizaĵoj kaj pri la E-elsendoj de la loka radio. Stefka Markova rakontis pri refondiĝo de la E-societo en la panfabriko „Evtim Apostolov“ — Gabrovo, pri la amika rilato de la administra kaj partia estraro de la fabriko al la E-agado.

Belčo Varsev salutis la konferencon je la nomo de la vicprezidanto de la Distrikta Konsilantaro pri Popola Klerigo, merita instruisto Ivan Tručev, kaj bondeziris prosperon en la E-instruado. En la nomo de CE de BEA Stefka Ĉenkova salutparolis kaj respondis al la starigitaj demandoj. Livorov el la Distrikta Komitato de BKP esprimis intereson pri la okazaĵoj sur la E-kampo kaj substrekis, ke la internacia edukado estas grava socia tasko. Popularigo de la sukcesoj de Bulgario per E-aranĝoj kaj korespondado estas valora. La E-agado servas la pacon.

Fine oni elektis novan Distriktan Estraron. La nova prezidanto estas Neno Janev.

SONJA TIŤHOVA

VELIKO TĀRNOVO

La distrikta E-konferenco okazis la 22-an de aprilo k. j. Ĝin partoprenis delegitoj el 9 E-societoj kaj gastoj.

Raporton pri la agado faris Hristo Dolčinkov, prezidanto de DE de BEA — Veliko TĀrnovo. Nuntempe 300 personoj en la distrikto lernas Esperanton en 20 lernejoj kaj 11 civitanaj kursoj. Estas 24 instruantoj, kiuj posedas instruarajn de Esperanto — 10 el Gorna Orjaĥovica kaj 8 el Veliko TĀrnovo. La folkloro ensemblo „Sider Vojvoda“ — Gorna Orjaĥovica, esperantiĝis kaj pe-

enlanda movado

re de la Internacia Lingvo gastis en eksterlando.

La delegitoj eldiris opiniojn pri la propagandaj materialoj, de kiuj oni jam delonge sentas akran bezonon.

Kelkaj plenumotaj taskoj: establo de Distrikta Metodika E-Centro, verdaj semajnoj en decembro kaj februaro, celebros de la 125-jariĝo de la E-pioniĝo Ĥristo Popov, kontaktoj kun ĝemelaj urboj en eksterlando.

La nova prezidanto de la Distrikta Estraro de BEA — Veliko Târnovo, estas Stefan Raškov. Nikola Najdenov estis reelektita kiel sekretario.

OLGA CANKOVA

RUSE

La 20-an de aprilo k.j. okazis priagada konferenco de la Distrikta Estraro de BEA — Ruse. Reprezentanto de la Centra Estraro de BEA estis ĝia sekretario Dimităr Papazov.

Per la raporto, tralegita de Georgi Dobrev, prezidanto de DE de BEA — Ruse, kaj per la eldiroj de la delegitoj oni raportis pri la atingoj kaj malperfektaĵoj en la E-agado. Plu okazas la ĉiujara Printempa Amika Renkontiĝo Esperantista (PARE). Enkadre de tiu printempa arango regule okazas E-renkontiĝoj de kooperativanoj kaj junuloj. Oni fondis kaj fortigas helpentreprenon „Esperanto“. Estis prenita decido pri konstruado de Distrikta E-Domo. Plivigliĝas la internacia korespondado je kolektiva kaj individua nivelo. Firmiĝas la internacia amikeco de Ruse kun la ĝemelaj urboj per spertintersanĝo, reciprokaj gastadoj kaj korespondado.

Oni raportis nekontentigajn rezultojn de la fakultativa instruado de Esperanto en la mezlernejoj. Oni prenis decidon fondi instruistan E-sekcion ĉe DE de BEA — Ruse, por plibonigi la fakultativan E-lernadon.

Oni emfazis ankaŭ la antaŭstarantajn taskojn pri inda celebros de la 100-jariĝo de Esperanto en 1987. La konferenco reelektis Georgi Dobrev kiel prezidanton.

JORDAN KALINOV

RAZGRAD

La sepa distrikta priagada konferenco de la distrikta E-organizaĵo okazis la 14-an de aprilo k.j. Gastoj de la konferenco estis Dimităr Papazov, sekretario de la Centra Estraro de BEA, Petăr Kolev, membro de la Buroo de Distrikta Komitato de BKP — Razgrad. Ĉeestis ankaŭ multaj delegitoj, gastoj kaj veteranoj el la distrikto.

La konferencon salutis grupo da infanoj kaj ĝejnuloj, partoprenintaj en la 17-a Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto en Plovdiv kaj okupintaj avangardajn lokojn. Ili estis premiitaj kiel de CE de BEA, tiel ankaŭ de DE de BEA — Razgrad.

Dank'al la kreita bazo kaj bonaj eblecoj por plivastigo de la E-agado en Razgrad-distrikto, estas organizitaj 12 E-kursoj por komencantoj. En la antaŭvespero de la konferenco estis fondita nova societo — dua ofiĉista societo ĉe SP „Globus“ en Razgrad. Estas fondotaj novaj E-societoj en Kubrat, Loznica k.a. Oni kreis E-klubojn en la lernejoj.

Kiel prezidanton de DE de BEA — Razgrad, oni reelektis d-ron Ivan Kirĉev. La konferenco pasis en solena kaj labora etoso.

M. GEORGIEVA

SMOLJAN

Sub la slogano „Per Esperanto por amikeco, paco kaj internacia kompreniĝo“ fine de aprilo okazis la 6-a konferenco de la distrikta E-organizaĵo. Ĝin partoprenis Petăr Todorov, vicprezidanto de CE de BEA, Nikola Primovski, estro de fako „Aĝitato kaj propagando“ ĉe la Distrikta Komitato de BKP, veteranoj-esperantistoj, delegitoj de la E-societoj el la distrikto.

Raporton faris Dimităr Marev, prezidanto de la Distrikta Estraro de BEA — Smoljan. Dum la raportperiodo la distrikta E-organizaĵo laboris plane, celdirekte kaj atingis signifajn rezultojn en sia tuteca multflanka agado. Oni venkis la malfacilaĵojn pro manko de materiala-teknika bazo kaj kvalifikitaj instruantoj. Per vastiĝinta mastruma helpagado la Distrikta Estraro plifortiĝis, kio helpis solvi vicon da problemoj. Pliboniĝis la internacia korespondado.

La kultur-amasa laboro evoluis kaj pliriĉiĝis. Estas atingitaj grandaj sukcesoj rezulte de la partopreno de esperantistoj el la urbo kaj la distrikto — en distriktaj, naciaj kaj internaciaj festivaloj kaj revuoj de la E-Parolo kaj Kanto. La E-kino-fotoklubo „Evridika“ stabiligis kaj per siaj filmkreaĵoj konigas al la bulgaraj kaj fremdlandaj esperantistoj la beliaĵojn, monumentojn kaj la socialisman realaĵon ĉe ni.

La organizita E-instruado realiĝis en someraj kursoj, seminarioj kaj fakultative — en iuj lernejoj.

Petăr Todorov, pritaksinte tre bone la ĝisnunan agadon de CE de BEA — Smoljan, donis konstruajn konsilojn pri la estonta laboro de la societoj. Rekomendojn pri krea agado

faris Nikola Primovski, kiu en la nomo de Distrikta Komitato de BKP pozitive aprezis la agadon de la distrikta E-organizaĵo.

Oni akceptis decidojn kaj elektis novan estraron.

MARIA DIČEVA

PARE'84

La 5-an de majo k.j. en la Distrikta Junulara Domo — Ruse, okazis la 9-a Printempa Amika Renkontiĝo Esperantista (PARE), organizita de la Distrikta Estraro de BEA kaj urba E-societo „Libero“. Partoprenis esperantistoj el la vico de enlandaj distriktoj kaj reprezentantoj de la ĝemela urbo Potsdam (GDR) fronte de Karl Müller, kaj de Bukareŝto — Olga Nika.

La kunvenon malfermis kaj gvidis Georgi Dobrev, prezidanto de DE de BEA — Ruse. Ivan Slavov, sekretario de la sama Distrikta Estraro, tralegis referaĵon omaĝe al la 40-jariĝo de la socialisma revolucio en Bulgario.

La gastoj el GDR kaj Rumanio kaj el nia lando salutis PARE'84 kaj donis donacojn. Junpioniroj el la Lernanta E-Klubo „Kolombo de l'paco“ ĉe lernejo „Ĥristo Smirnenski“ donacis florojn al la honora prezidantaro kaj prezentis mallongan programon.

Riĉan belartan programon en Esperanto prezentis la Amatora E-Teatro — Ruse, sub la gvido de Nadejda Sirkova. Sekvis gaja Interkona Vespero.

La duan tagon la gastoj el la lando kaj eksterlando vizitis la Panteonon de la Renesanculoj, la muzeon „Baba Tonka“ kaj aliajn vidindaĵojn de la urbo.

Enkadre de PARE'84 okazis renkontiĝoj de la kooperativanoj kaj junuloj.

PARE'84 finiĝis per alvoko pri amasa partopreno en la venontjara 10-a jubilea Renkontiĝo, kiun oni dediĉas al la 100-jara jubileo de Esperanto.

JORDAN DIMITROV

LERNANTA E-KLUBO „KOLOMBO DE L'PACO“

En kunlaboro kun la estraro de lernejo „Ĥr. Smirnenski“ — Ruse, okazas kursoj de Esperanto. Sub la aŭtoritata gvido de la instruistino-pensiulino Maria Belĉeva, dekoj da junpioniroj kun intereso lernas la lingvon de la paco kaj amikeco, kreskas kiel flamaj patriotoj kaj internaciistoj. Ili korespondas kun siaj samaĝuloj el ĝemelaj urboj el la socialismaj landoj kaj el kapitalismaj landoj.

Enkadre de la lerneja klubo por interna-

cia amikeco estas fondita Lernanta E-Klubo „Kolombo de l'paco“. Ĉe ĝi oni kreis grupon por amatora artaktivado, kiu ĉiam pli ofte prezentigas antaŭ urbanoj. Preskaŭ en ĉiuj E-kunvenoj kaj solenaĵoj en Ruse junpioniroj prezentas emociajn programojn en Esperanto, rusa kaj bulgara lingvoj.

Per obstino kaj aŭdaco ĉe la alproprigo de la instrumaterialo, en la ekposedo de Esperanto, per siaj amatoraj artprogramoj, la junpioniroj el la E-Klubo „Kolombo de l'paco“ kontribuas por realigo de la noblaj idealoj de la Asembleo „Standardo de Paco“ sub la entuziasma devizo „Paco — kreado — beleco“.

JORDAN KALINOV

JAPANAJ PENTRAĴOJ PRI PACO

La E-rondo en IV baza lernejo „Nikola Vapcarov“ — Sumen, ricevis pentraĵojn de japanaj infanoj, dediĉitaj al la batalo por paco. Ili esprimis sian volon por paco sur nia planedo kaj proteston kontraŭ la instigantoj de nuklearmila milito. La posteuloj de la viktimoj de la atombombo el Hiroŝima subskribis siajn pentraĵojn per la vortoj:

Tukamoto Miŝo — 11-jara: „En Japanio du urboj estis atombombitaj — Hiroŝima kaj Nagazaki. Hiroŝima suferis plej multe“.

Taguĉi Keiĵi — 11-jara: „La registaro de Nakasone kune kun Usono intencas transformi nian landon en flughavenon. Ni batalu por la mondpaco!“

Miamoto Konĵi: „Ni neniigu la militon. Ni kune defendu la pacon kaj ne allasu militon!“

Hamamoto Naoto: „Mi esperas, ke ni ĉiuj en la mondo povas vivi agrable kaj feliĉe. Pro tio ni deziras neniigi la nukleajn armilojn“.

De la pentraĵoj ni organizis ekspozicion en la lernejo. Ĝi provokis grandan intereson inter la lernantoj kaj instruistoj. La saman ekspozicion oni montris dum la distrikta priagada konferenco en Sumen.

Responde al la japana alvoko pri paco niaj gelernantoj sendis al Japanio siajn pentraĵojn pri la pacbatalo.

NELI DIMITROVA

NI FUNEBRAS

La 27-an de oktobro 1983 forpasis la sindona 71-jara esperantistino

ELENA VASKOVA

Per ŝia morto la bulgara E-movado perdis unu el la plej fervoraj propagandantoj de Esperanto. Ni respektive kliniĝas antaŭ ŝia memoro!

DE de BEA — Plovdiv

KONCIZAJ KOMENTOJ

GABROVO, SMOLJAN

Du distriktaĵaj priagadaĵaj konferencoj, en kiuj oni faras bilancon de la pozitivaj kaj negativaj flankoj, ĉiu laŭ sia specifo. Plimultas la bondeziroj, kiuj tamen estas enhavoriĉaj kaj valoraj por la estonta laboro. La realigo de la rekomendoj kaj sugestoj certigus pli bonan estonton de ambaŭ distriktaĵaj organizaĵoj!

VELIKO TĀRNOVO

La korespondaĵo estas konciza kaj konkreta. La malnova DE atingis sukcesojn en la kursa laboro kaj en la esperantigo de la folkloro ensemblo „Sider Vojvoda“ el Gorna Orjaho-vica, kiujn la novelektita DE devas reteni. Ĝi metis novajn taskojn tiudirekte. Ni bondeziru „bonan vojon!“

RUSE

La Distrikta Estraro de BEA — Ruse, traktis principe kaj sincere dum sia priagada konferenco la atingojn kaj problemojn — tio estas la konkludo, kiun mi tiris post la finlego de la korespondaĵo. La sama estis la konkludo, kiun mi tiris por mi mem post la finiĝo de la konferenco, en kiu mi partoprenis.

En Ruse kiel en aliaj lokoj oni serĉas la vojon al kreo de formo por altigo de la kvalifiko de la instruantoj de Esperanto. La distrikta E-organizaĵo en Ruse estas unu el la fortaj DE en nia lando. Ĝi orientiĝas al plivastigo kaj plibonigo de la agado. Tio estas nek facila, nek rapide realiĝos, ĉar la vivo iom post iom prezentas novajn problemojn. Tamen ekzistas ĉiuj premisoj opinii, ke la serĉata vojo estos trovita — por tio estas kaj deziro, kaj strebo, kaj eblecoj.

RAZGRAD

Longan periodon la distrikta E-organizaĵo en Razgrad-distrikto estis objekto de atento flanke de la Centra Estraro de BEA. Mi rememoras kiel vigle pasis plenkunsido de la Distrikta Estraro de BEA — Razgrad, provokita de la CE de BEA, kiun mi ĉeestis. Mankis klubejo, oni serĉis novajn kaj laborpretajn

malnovajn esperantistojn. La fortostreĉoj donis rezulton.

Lastatempe en Razgrad-distrikto regas entuziasmo, kiu plene manifestiĝis en la distrikta priagada konferenco. La raporto kaj la eldiroj, faritaj en spirito de realismo, montris la ambicion, ke la Distrikta Estraro viciĝu inter la unuaj en la lando. Unuanime estis substrekitaj la rolo de d-ro Ivan Kirĉev, la ĝisnuna kaj reelektita prezidanto de la DE de BEA — Razgrad, por la reviviĝo de la E-agado en la distrikto. La konferenco pasis tre bone kaj tio estas plia garantio por la estonta laboro.

RUSE

La Printempa Amika Renkontiĝo Esperantista (PARE) estas unu el la solidaj enlandaj E-aranĝoj. En ĝiaj kadroj ĉiujare okazas renkontiĝoj de la kooperativanoj kaj junuloj. Tiel ĝi rompas la kadrojn de amika interkona renkontiĝo. Impresas, ke en Ruse denove aperas sur la scenejo sub la gvido de Nadeĵda Sirkova la Amatora E-Teatro, kiu depost kelkaj jaroj sukcese funkcias. La laborparto kombiniĝas ankaŭ kun trarigardo de la vidindaĵoj en Ruse, kiuj mem efikas eduke en spirito de patriotismo. Trafa decido estas, ke la 10-an Jubilean PARE oni dediĉos al la 100-jara jubileo de Esperanto. Jam nun ni bondeziras al ĝi sukceson!

* * *

La Lernanta E-Klubo „Kolombo de l'paco“ laŭ sia agado estas unu bona lernanta klubo; ĝi funkcias enkadre de la lerneja klubo por internacia amikeco, disvolvas amatoran artaktivadon kaj agadas ankaŭ ekster la lernejo; ties membroj korespondas kun siaj samaĝuloj el eksterlando, aparte kun ĝemellaj urboj de Ruse.

La ekzemplon de la junaj esperantistoj oni devas imiti kaj plivastigi la ĉiufankajn kontaktojn kun la ĝemellaj urboj. Krom tio la infanojn oni frue devas direkti kaj kuraĝigi al korespondado kun eksterlando, kio altiĝos iliajn lingvokononajn kaj larĝigos ties spiritan horizonton, kiel ankaŭ ebligas al iliaj fremdlandaj leteramikoj konatiĝi kun ilia feliĉa infaneco.

Skribinte tiel belajn vortojn pri la Klubo mi ekdeziris kontroli en la kartoteko de CE de

BEA ĉu oni registris la Klubon. Evidentiĝis, ke... la Klubo, kiu disvolvas bonan kaj utilan agadon, ne membras en BEA. Por esti membro de BEA iu klubo aŭ societo devas: unue, pretigi en 2 ekzempleroj fandan protokolon, subskribitan de minimume 5 fondintoj; due, sendi po unu ekzempleron de la fonda protokolo al la koncerna Distrikta Estraro kaj al Centra Estraro de BEA — Sofio; trie, la Buroo de DE de BEA devas konfirmi la ekziston de la klubo aŭ societo kaj sciigi pri tio la kancelarion de Centra Estraro de BEA — Sofio. Tio estas laŭstatutaj postuloj, kiuj ne estas formalajo. Estas multaj tiaj kluboj en iuj distriktoj. Ili devas registriĝi ĉe la Centra Estraro por esti regulaj; ja komenciĝas la konkuro inter la E-societoj kaj Distriktaj Estraroj omaĝe al la 41-a Kongreso de BEA, kaj DE, kiuj registros plej multe da kluboj aŭ societoj, okupos pli antaŭan lokon en la konkurado.

SUMEN

Brave al la E-Klubo ĉe IV Baza Lernejo en Sumen! Ni salutas ilin pro la pentrajekspozicio de japanaj infanoj, dediĉita al la porpaca batalo. Ili iniciato estas imitinda de la aliaj kluboj. Krom ke oni edukas la infanojn batali por paco, tio estas la plej bona propagando de Esperanto.

Ankaŭ ĉi-foje ni trafis klubon, neregistritan ĉe la Centra Estraro de BEA. Tiuj du kazoj kun neregistritaj lernantaj kluboj, kiuj disvolvas bonegan agadon, stariĝas la demandon: ĉu ni sufiĉe bone konscias la signifon de la aliĝo de kluboj al la sistemo de BEA kaj kiu devas prizorgi tiun organizan flankon de la afero — la fondintoj, la Distrikta Estraro aŭ la loka societo. La respondo estas, ke dependas de la konkretaj kondiĉoj; ĉiukaze la Distriktaj Estraroj devas havi superrigardon pri la aferoj.

La menciitaj ekzemploj montras, ke neregistritaj estas iuj enlandaj kluboj. Se ĉiuj registriĝus ĉe BEA, ni certe viciĝus je unua loko en la mondo laŭ nombro de societoj kaj kluboj.

OPINIO DE LEGANTO

Kun granda intereso mi legis la artikolon de Marin Baĉev „La E-instruado — nepre reorganizenda!“ („Bulgara Esperantisto“, 7/83).

Marin Baĉev pravas: ne necesas instrui en unuagrada kurso tro multe da vortoj kaj la tutan gramatikon. Prefere kursanoj lernu ne tre multe da radikoj, sed la plej necesajn kaj uzatajn radikojn.

Mi opinias, ke ankaŭ aliaj E-instruistoj el multaj landoj samopinias kun Marin Baĉev. Li esprimis tion, pri kio pensas multaj.

GENADIJ KULAGIN,
Vladivostok, USSR

ESPERANTISTA PACFORUMO EN PARDUBICE

Laŭ jam ekzistanta bona tradicio — ĉi-jare por 6-a fojo en Pardubice, Ĉeĥoslovakio, de la 23-a ĝis la 25-a de marto kolektiĝis esperantistoj-pacbatalantoj el la tuta mondo, inter kiuj preskaŭ unu triono — ĝejnuloj. La nombro de ĉeestantoj estis duobla kompare kun la pasintaj jaroj — ĉirkaŭ 700 personoj el 11 landoj. 185 estis eksterlandaj delegitoj. Dum tiuj tagoj la ĉeestantoj povis senti la bonegan rilaton de la partia estraro de Pardubice kaj de la regiono al tiu ĉi renkontiĝo. Okazis publikaj diskutoj en tri grupoj laŭ temoj: „Partopreno de esperantistoj en la batalo por paco“, „Esperanto kaj UN“ kaj „Esperanto en la scienco“. Estis realigita ĝemeligo de du urboj — Liège — Francio kaj Lamiček — Ĉeĥoslovakio, per intersaĝo de pecoj da tero de la tombejoj de ambaŭ urboj, kiuj dum la Dua Mondmilito havis la saman sorton — en ili la faŝistoj terure mortigis tute senkulpajn homojn, sen verdikto!

Estis akceptita alvoko al la esperantistoj en la tuta mondo, en kiu interalie estas skribite: „Ni, esperantistoj, uzantoj de la internacia lingvo Esperanto, kies ĉefa strebado estas interkompreniĝo inter la homoj de la tuta mondo, ni konscias tion, ke la armado kaj ĝia eskalado alportas al la homaro senmezurajn damaĝojn. Same la agresoj elvokataj en diversaj partoj de la mondo grandigas la danĝeron de tutmonda militbrulego. Tial ni aktive partoprenantaj la Tutmondan Pacan Movadon, multoblighis nian strebadon kaj transigos ĉi tiun nian pacan aktivecon sur la vastan publikon de niaj landoj, kun la penado, ke en ĉi tiu proceso estu envicigitaj ankaŭ tiuj homoj, ĝis nun flanke starantaj.“

Venko de la pacamaj homoj en ĉi tiu batalo signifas savon de nia planedo — savon de la vivo sur ĝi“.

En ĉiuj aranĝoj partoprenis reprezentantoj el Bulgario, Hungario, Pollando, GDR, Belgio, Nederlando, Francio, Britio, Aŭstralio, ka. Plenaĝuloj kaj ĝejnuloj, kun diversaj profesioj kaj religioj, sed kun unu komuna deziro en la koro — ke estu paco!

En la internacia programo partoprenis profesiaj aktoroj kaj amatoj, plenaĝaj kaj junaj, el diversaj landoj. Estas agrable por ni, ke nia lando ankaŭ havis en la programo sian junan reprezentantinon — M. Elenova. Per kantoj kaj recitado, ĉiuj parolis pri unu sama afero: ke la mondo restu mondo paca!

Dum la junulara renkontiĝo en la lasta tago kaj dum la internacia balo per la gaja kaj viva dancado kaj amuzoj la junularo ankoraŭfoje pruvis sian deziron vivi trankvile, senzorge, gaje — en paco!

M. E.

TRA LA GAZETARO

PRI LA 36-A KONGRESO DE IFEF:

En nia gazetaro aperis konsiderinda nombro da artikoloj kaj informoj pri la 36-a IFEF-kongreso dum la prepara periodo. Pri la lastaj de ili ni informis en nia rubriko „Tra la gazetaro“.

Kiam la kongreso venis la gazetaro spontane reeĥis, ĉefe lige kun la gazetaraj konferencoj en Sofio, la 7-an de majo, kaj en Slanĉev Brjag, la 11-an de majo, kiujn bonege organizis la Kongresa Gazetara Servo, lerte gvidata de nia kolego Donĉo Ĥitrov.

Sub titolo „La reloj ligas la landojn — Esperanto la popolojn“ ĉiutaga ĵurnalo „**Zemedeľsko Zname**“ (8.V.1984), organo de la Agrarana Partio, aperigis ampleksan informon de Asen Karasimeonov pri la antaŭstaranta kongreso, pri la jubileo de IFEF, surbaze de eldiroj de s-ro Giessner, prezidanto de IFEF, en la gazetara konferenco. La junulara ĉiutaga ĵurnalo „**Narodna Mladeť**“ (8. V. 1984) aperigis informon „La kongreso de esperantistoj-fervojistoj“ de Dragomir Aleksandrov. Prikongresan informon aperigis ankaŭ la ĉiutaga ĵurnalo „**Kooperativno Selo**“ (8. V. 1984). La semajna transportista gazeto „**Transporten Glas**“ (9. V. 1984) dediĉis preskaŭ tutan paĝon al la kongreso. Sub titolo „Esperanto — lingvo de la amikeco“ la redakcia ĵurnalisto Ivan Nejkov detale informas pri la antaŭstarantaj kongresaj aranĝoj, pri Esperanto inter bulgaraj fervojistoj. Sekvas triokolumna skizo de ĵurnalisto Mira Radeva pri Georgi Litov, esperantisto-fervojisto, kiu jam pli ol 20 jarojn vaste korespondas kun amikoj tra la tuta mondo. La 16-an de majo la sama gazeto detale informis pri la solena malfermo kaj pri la laboro de la kongreso. Ĵurnalo „**Ĉernomorski Front**“ (12. V. 1984) eldonata en u. Burgas, en kies distrikto troviĝas ankaŭ Slanĉev Brjag (Suna Bordo), donis lokon al sufiĉe granda prikongresa informo.

Radio Sofio, Radio Stara Zagora, Radio Varna kaj aliaj radiostacioj kelkfoje informis pri la kongreso, bedaŭrinde ni ne disponas pri ĝusta nombro de la elsendoj. La Bulgara Televido en sia plej populara informa programo je la 20-a horo elsendis la 7-an de majo

informon pri la antaŭstaranta kongreso, kaj la 13-an de majo elsendis bildan raportajon pri la solena malfermo.

EN SOFIO:

La kultura semajna gazeto „**ABV**“ (22. V. 1984) donis lokon al kvarkolumna skizo pri veterano-esperantisto Dimităr Andreev el u. Asenovgrad kun portreto. La skizon verkis Tanja Piškova.

EN LA PROVINCO:

Ĵurnalo „**Novo Ludogorie**“ — u. Razgrad (26. IV. 1984) presis longan informon de Teodora Petrova pri la distrikta esperantista konferenco. J. „**Botevgradski Plămak**“ — u. Botevgrad (1. V. 1984) aperigis dukolumnan informon pri preparaj laboroj lige kun celebrado de 80-jara jubileo de la meritoplena publicisto, sociaganto kaj aktiva esperantisto Trifon Ĥristovski, naskita en v. Radotina, regiono de Botevgrad. La celebradon preparas la plej altaj lokaj instancoj. J. „**Dunavska Pravda**“ — u. Ruse (10. V. 1984) aperigis rubrikon „Esperantaj novaĵoj“, entenanta informon pri distrikta konferenco de la esperantistoj kaj informon pri la agado de la lernanta Eklubo „Kolombo de la paco“ ĉe lernejo „Ĥristo Smirnenski“ en u. Ruse. La rubrikon gvidas nia veterano-ĵurnalisto Jordan Kalinov.

KR. KARUCIN

ENHAVO

ĤR. GOROV. Altkvalita laboro unualoke!	1
E. GEORGIEV. Kun vervo kaj konvinko	11, 5, 6, 7
D. ĤITROV. IFEF-Kongreso — duan fojon en Bulgario.	2, 3, 4
* * * Tra la leteroj	7
HRIMĀ. Heroo-martiro	8
L. RAEVA. Tagoj de la Esperanta Kulturo	9, 10, 11
E. GEORGIEV. Radoslav Triĉkov — 85-jara	12
* * * Enlanda movado	12, 13, 14, 15
M. E. Esperantista pacforumo en Pardubice.	16
* * * Tra la gazetaro	111
D. SIMEONOV. Bulgaroj sur Everesto	1V

Sur la unua kovrilpaĝo: La haveno de Nesebăr.

Foto: Ivan Popov

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta Komitato: Marin BĀCEV, Vasil BOROVIANSKI, Radoslav DOJĈINOV, prof. d-ro Kiril POPOV, Dimităr ĤAĜIEV, Krástju KARUCIN.

Administranto — Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Ĉirilo kaj Metodjo“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„**BULGARA ESPERANTISTO**“

Bul. „Ĥristo Botev“ 97

1303 Sofio, Bulgario

tel. 31-70-19

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenín 117

P. K. 66

1 000 Sofio



BULGAROI SUR EVERESTO



Grupo de alpistoj el la bulgara himalaja ekspedicio Everesto '84

La 20-an de aprilo 1984 ĉiuj amaskomunikiloj en la mondo multfoje ripetis la sciigon elsenditan el Katmandu — la ĉefurbo de Nepalo: la saman tagon, je 18,10 horo la bulgara alpisto Hristo Prodanov — 41-jara ingeniero-metalurgiisto el Sofio, surgrimpis la plej altan montopinton de la planedo — Evereston (8848 m) laŭ ties Okcidenta Deklivo, nomata „La Krue-la Vojo“. Prodanov estas la dektria homo en la mondo, ascendinta Evereston sen oksigena masko kaj la unua, kiu faris tion laŭ la Okcidenta Deklivo de la monto. Li estis la unua bulgaro, kiu en 1981 surgrimpis la kvaran laŭ alteco montopinton Lho Tse (8516 m.) en Himalajo.

Lia senprecedenca heroo surgrimpis de Everest estis venko de la tuta bulgara alpista ekspedicio en Himalajo, sed Prodanov tragike pereis, revenante al la baza tendaro.

Unu brava bulgaro, unu el la plej spertaj kaj fortaj alpistoj en la mondo, realiginte sian longe sopiratan revon, restis por ĉiam sur Everest.

La unua bulgara venkinto de Everest pereis, sed la ceteraj membroj de la bulgara ekspedicio, rekonstruinte la detruitajn de la uraganaj ventegoj kaj superŝutitajn de la falinta dika nego tendarojn, preparis sin por novaj atakoj de la himalaja plejaltulo.

La 8-an de majo je la 17,15 horo la radiostacio de la baza tendaro kaptis ĝojan sciigon: ankaŭ la bulgaroj Ivan Vâlčev kaj Metodi Savov estas sur Everest!

Ili estas surgrimpintaj la ŝtonan koloson kun oksigenaj maskoj, ĉe ege malfavoraj kondiĉoj pro la falinta dika nego kaj pro danĝero de lavangoj. Por atingi la montopinton ili grimpadis dum 13,55 horoj. Post 23-minuta restado sur Everest ili komencis supreniri laŭ la Suda Deklivo, sed pro la malboniĝinta vetero ili decidis trankoti sub libera ĉielo je alteco de 8700 m. Tio estis la plej alte situanta bivako en la historio de alpismo!

La dua alpista paro — Nikolaj Petkov kaj Kiril Doskov, surgrimpas Evereston la 9-an de majo 1984, je la 10,38 horo. La niveldiferenco de 728 m ili venkas en daŭro de 7,38 horoj kaj starigas rekordon pri plej rapida surgrimpado de Everest laŭ la ŝtonkovrita Okcidenta Deklivo de la monto.

La saman tagon la kvar bulgaroj atingas la Sudan Deklivilon kaj realigas plenan transiron de la monto laŭ nekredeble malfacila itinero, kiu ekde nun estos nomata „Bulgara Trairo de Everest“.

La bulgara himalaja alpista ekspedicio „Everesto-84“, dediĉita al la 40-jara datreveno de la venko de la socialisma revolucio en Bulgario kaj al la 80-jariĝo de la revolucia sindikata movado en nia lando, atingis sian celon — la bulgara nacia trikolora flago flirtas super la „Tegmento de la mondo“ — montopinto Everest!

La telegramo-mesaĝo de la unua partia kaj ŝtata gvidanto de PR Bulgario Todor Jivkov estas plej granda rekono pri la herooj de niaj alpistoj. Jen kelkaj linioj el ĝi:

„Karaj kamaradoj, tutkore mi gratulas ĉiujn partoprenantojn en la ekspedicio pro ilia eksterordinara sukceso — la ascendo de la plej alta montopinto de la planedo — Everest!“

Kaj la Patrujo, kaj la tuta bulgara popolo ĝisatendis tiun neforgeseblan ĝojan momenton — renkonti siajn bravajn filojn, kiuj ornamis per nevelkanta gloro ne nur sin mem, sed la sporton de socialisma Bulgario ĝenerale. Ili plenmerite estis distingitaj per plej altaj ŝtataj titoloj kaj ordenoj.

Al novaj herooj kaj sukceso, bulgaraj bravuloj!

D. SIMEONOV

ATANAS STOJANOV

SERĈADU L'ALPISTON

Serĉadu lin, la alpiston bulgaran!
Serĉadu lin, eĉ se jarcent', jam pasis!
En l'abism' infera, meze de l'stelaro —
ne facile la bulgar' pereas!

Serĉadu lin sur la dekliva rando,
sur verto tera — li troviĝas tie,
el manoj siaj faris li la stangon
por la bulgara sankta flago nia.

Serĉadu lin, l'alpiston, la bulgaron
kaj lian impetemon ne riproĉu:
instruon prenis li de Buzluĝa¹ kaj Vela²,
ke li al risko ĉiam sin dediĉu.

Serĉadu lin ĉe tiu sankta flago —
ne meze de la neĝoj, uraganoj,
ĉar laŭ leg³ malnova la bulgaro
ne falas malproksime de la flago.

Tradukis: L. BOJAĜIEVA

^{1/} Buzluĝa — pinto en Balkanmontaro, kie en 1891 okazis fonda kongreso de la Bulgara Socialdemokratia Partio, nun Komunista Partio.

^{2/} Vela Peeva — heroe pereinta partizano.

